

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale  
PLENUMITA 07/05/2020 Kvarcentsepdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

### Entute **733,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **285,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **237,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde junio 2020 ?)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*

### Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.” N.ro.119



Por pli klare vidi, kio okazas en la Mediala Voĉo, ni uzu kiel ekzemplon la aktivvoĉan frazon “La knabino lavas la ŝtonon (sur la marbordo)”. Ni scias kiel ŝanĝi ĉi tiun aktivvoĉan frazon al sia pasivvoĉa kaj al sia faktitivvoĉa alternativoj, sed kiel ŝanĝi ĝin al sia medialvoĉa alternativo? La regulo estas, ke oni ĉe la Mediala Voĉo nur volas vidi tiun parton de la bildo kiu montras la agon kaj la suferanton, tiel ke la aŭskultanto ne sciu la originan aganton (la knabinon). En tiu kazo la aŭskultanto povas nur diveni tion: ĝi povus esti knabino aŭ knabo aŭ la pluvo aŭ la vento aŭ la marakvo aŭ la sablo aŭ ĝiaj eksteraj molekuloj.

Sed la rezulto estas, kvazaŭ la knabino lavas la ŝtonon. Tiu kvazaŭeco estas esenca al la mediala voĉo: kio okazas (la laviĝado) estas kvazaŭ iu aŭ io kaŭzas la lavadon sed ni ne montras la reston de la bildo, ni ne montras kiu kaŭzas la lavadon.

En Esperanto la aplikado de la mediala voĉo kompreneble estas perfekta kaj senescepta: la nura, kaj natura, kondiĉo estas, ke la origina verbo estas transitiva. Kio okazas en etnaj lingvoj? **Marcel Leereveld.**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



## Estrarkunveno 2020-04-30

Partoprenis Sandor, Jonathan, Indrani, Heather, Terry, Bradley kaj Ivan;

Keyhan(Irano), Indrani

### (1) VIRTUALA IRANA ESPERANTO KONGRESO(16-19 APRILO 2020)

Keyhan, la prezidanto de la Irana Esperanto Asocio rakontis pri la organizado de la VIRTUALA Irana Esperanto Kongreso. ... Kaj donis al ni multajn ideojn por klopodi organizi similajn eventojn en Aŭstralio. Ankaŭ Ilia el Indonezio partoprenis kaj laŭdis la sukcesan virtualan kongreson.

### (2) SOMERKURSARO – jan 2021

Ni daŭrigas esplori la eblajn partopreno(j)n de Katalin Kovacs, Istvan Ertl kaj Bertilo Wennergren. Ni atendas respondojn.

Ni ankaŭ esploris la eblecojn dividi la kongreson/somerkursaron kun ne ĉeestantojn virtuale.

### (3) ESPERANTO TAGO – DIMANĈO, la 7-a de junio

Ni decidis okazigi VIRTUALAN nacian “Esperanto-Tagon”.

Reservu la tagon, partoprenu kaj pensu pri prezenti ion.

### (4) NOVASPEKTA RETEJO

Ni ĉiuj refoje gratulis Jonathan pri la starigo de nia nova AEA retejo.

Bv speciale konsulti la liston de diversaj regulaj Zoom/Skype kunvenoj tra la lando..... kaj ne hezitu... partoprenu!

Venonta kunveno: jaŭdo 14-a de majo 2020.

**Sandor Horvath**



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Majo 2020 n-ro: 53



## RESTU HEJME

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Klaku [Turka Stelo 53](#) kaj ĝoju legi bonan esperantan gazeton



## Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Roger Springer



## Iran:- Alia vidpunto.

Se ni difinus la iranajn ekonomiojn per unu mallonga frazo, ĝi estus:

Ĉiuj estas pripensataj, sed la bezonoj de la malsuperaj klasoj devas veni unue.

[Iran's 'resistance economy'](#)

(Angla artikolo sed Roger Springer traduka loko ekzistas)



## El Esperanto-domo, Sidnejo

La nuraj kunvenoj de la Federacio nun estas retaj: ĉiun sabat-vesperon de 18:00 ĝis 20:00 per Zoom: <https://us02web.zoom.us/j/94684883109?pwd=WUdpSHV2RkV2QmVPZjZDR3JHZHYyUT09>

Jen ekranbildo de lasta sabato, 25a aprilo 2020:

Jonathan Cooper



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



## Batalo kontraŭ la Kronviruso

La mondĉefoj nuntempe devus trovi vidpunkton novan koncerne la "Defendo"n. Evidentiĝas, ke la trilionoj da dolaroj elspezitaj ĉiujare por militaj fuzaĵoj, tankoj, pafiloj, ofertas nulan reziston kontraŭ viruso kiu genuigas la tutan mondon. La disvastigo de la kronviruso relative proporciigis laŭ la loĝantara denseco kaj la rapideco de la respondo de individuaj registaroj. Kiel kutime, la plej malriĉaj suferos la plejmulte. Kaj tio estas ne nur koncerne la nombron kiu mortos, sed ankaŭ pri la financa katastrofo kiu sekvos. Kiel relative feliĉaj ni kaj niaj kuzoj trans la Tasmana Maro estas, vivantaj tiel malproksime de la cetero de la mondo, kaj havante registarojn (landajn kaj ŝtatajn) kiuj agis rapide je pluraj facetoj de la problemo. Ankoraŭ estas fruaj tagoj; ni laboru kaj esperu - kaj restu hejme kiel plej eble, daŭrigante la manlavadon; tiel ankaŭ, ni esperu, trafos nin malpli da ordinarij influencoj kaj malvarmumoj.

Vera Payne.



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Multe da pluvo en mia ĝardeno.



### NIAJ PLUVEGOJ.

Dum la lasta semajno ni havis bonegajn pluvojn, ĉi tiun jaron pli ol dum la tuta pasinta jaro.

Dum la resto de la jaro la arboj en mia ĝardeno bezonos almenaŭ dekoble pli da pluvo, por normale vivi, ĉar la suba tero estas tiom seka.

Marcel.

### LA KRONVIRUSO .

Mi plendis pri la ĉina registaro, kiu per diktatoraj kapabloj kaŭzis ke la ĉinaj aŭtoritatoj komencis kontraŭbatali la viruson unu semajnon post la malkovro. Ĉu mi rajtas fari tiun plendon, se mi ne samtempe plendegas pri la du aliaj komercaj geamikoj de Aŭstralio, Usono kaj Britujo, kiuj perdis multe pli da tempo por komenci draste kontraŭbatali, unu eĉ nun ankoraŭ ne sufiĉe? Kaj mi devas eĉ ankaŭ plendi, ne plendegi, pri aŭstraliaj registaroj, kiuj ankoraŭ en Marto permesis al la pasaĝeroj de usonaj flugmaŝinoj eniri nian landon sen kvarantino, kaŭzante ke pluraj virusportantoj libere eniris la landon kaj infektis plurajn aliajn aŭstralianojn.

Marcel.

### RIMARKOJ PRI LA RESPONDO DE DONALD KAJ VILĈJO .

Mia moto

(por multaj eŭropaj lingvoj):

Kiam la (aktivvoĉa) *-ing*-participo indikas la nunan agtempon, ni nomu ĝin

PRESENT PARTICIPLE .

Kiam la *-ing*-participo indikas la kontinuan/imperfektan agtempon/aspekton, ni nomu ĝin

CONTINUING PARTICIPLE .

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Kiam la *-ed*-participo indikas ne tempon sed nur pasivecon, ni nomu ĝin

PASSIVE PARTICIPLE.

Kiam la (nun aktivvoĉa) *-ed*-participo indikas la agtempon, ni nomu ĝin

PAST PARTICIPLE.

Pri mia origina artikolo mi donu du senkulpigojn: **Unue** mi nur ŝerce menciis la ideon, ke la eŭropaj lingvistoj ne konas sian propran gramatikon; kompreneble ili konas ĝin, perfekte kaj ne ĉiam sammaniere. Mi malsamopinias kun ili nur pri unu malgranda funkcio kaj nomo, kiu nur gravas por kompreni Esperanton. **Due** mi ĝeneraligis, sen menciigi la esceptojn, pri kiam mi menciis ke la Pasiva Participo uzatas kun la helpverbo “esti” por fari la Pasivan Voĉon, kie mankis ke en kelkaj lingvoj oni uzas alian helpverbon, kiel ekz. “*werden*” en la germana, kaj kie mi ankaŭ ne aldonis, ke por fari la Perfektan Tempon kelkaj lingvoj uzas, kiel escepton, kelkfoje la helpverbon “*have*” por kelkaj verboj. Mi ne menciis tion, ĉar tiuj esceptoj neniel afektas la ĝeneralajn regulojn de mi menciitajn. Sed la rezulto estis, ke Donald/Vilĉjo (ĝuste) argumentis pri tiu ĝeneraleco kaj trovis esceptojn. Mi ja tute konsentas kun tiuj esceptoj. Sed mia nura celo estis indiki ke ekzistas du malsamaj *-ed*-participoj, unu ĝenerale kun “esti” kaj unu ĝenerale kun “havi”. Sed ĉi lastan Donald/Vilĉjo ne argumentis, kaj eĉ Wikipedia mencias. Mia plua celo estis ke por tiuj du malsamaj funkcioj oni bezonas du malsamajn participo-nomojn. Cetere mi samopinias, kompreneble, pri iliaj aliaj opinioj. Mi bedaŭras pro mia ĝeneraligo, sed almenaŭ povis legi interesan liston de la Paska Saluto, kiujn tradukojn mi alie ne povas legi, ĉe Wikipedia, ĉar mi estas legoblinda.

“**La respondo**” de Donald kaj Vilĉjo konsistas el du partoj.

En la unua parto, la plej mallonga, Donald/Vilĉjo mencias kion Wikipedia opinias pri la participoj, ĝenerale. Ili ankaŭ mencias, ke la afero pri la participoj ne estas tiom simpla kiom mi opinias. Mi plu opinias, ke la afero estas simpla. Sed kompreneble la eblaj kompleksaj formoj estas kompleksaj, sed ne malkompreneblaj. La proponeto de Cristal nomi la participojn laŭ la formo *-ing*-participoj kaj *-ed*-participoj estas utila, por la angla, sed ne indikas iliajn funkciojn. Legante tra la Wikipediaĵoj mi tamen ne komprenis, kial Donald/Vilĉjo ne forte kritikis la evidentajn erarojn en ilia tezo. Unue la angla lingvo NE havas du agtempojn; ĝi havas tri: prezenca, pasinta, kaj futura. (Respondo ke la futuro konsistas el du verboj ne validas, ĉar en la Wikipedia-listoi aperas la pasiva voĉo, kiu konsistas el du verboj). Krome kelkaj aspekto estas tempoj, ĉar temas pri parto de tempo (daŭra tempo). Fine ekzistas kvar voĉoj, ne du: aktiva, pasiva, mediala (“*Don’t worry, the car will GET WASHED*”), kaj faktitiva voĉo (“*I MADE him REPAINT the wall*”). Bedaŭrindas ankaŭ, ke Wikipedia nenie mencias ke la simplaj agtempoj (tensoj) kovras la tutan agon de komenco al fino. Ĝenerale miaj reguloj pri kio estas kia participo, aplikiĝas kun la anglaj helpverboj “*be*” kaj “*have*”, kaj pri aliaj vortoj en aliaj eŭropaj lingvoj, ĉar la regulo estas kaj restas (simpla), ke ekzistas tri (aŭ kvar) participoj, kiuj ĉiuj havas sian propran funkcion kaj sian propran nomon, ĉu ili forme egalas aŭ ne (same kiel la formo “*work*” reprezentas du gramatike malsamajn vortojn, kun “*the*” aŭ kun “*to*”).

La dua parto de la “Respondo” temas pri la diversaj tradukoj de la Paska Saluto kaj la diverseco en tio (tiu dua parto devis temi pri la funkcioj kaj nomoj de la tri participoj). Mi akceptas, ke Donald/Vilĉjo opinias, ke la diversaj tradukoj de la Paska Saluto havas malsamajn signifojn. Ekzemple la traduko en unu lingvo povas signifi agon, kaj en alia lingvo staton. Tio

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

dependas de la vortoj kaj kombinaĵoj uzitaj. Do ne atendu unu solan signifon por la ses lingvoj. En la portugala la origina signifo fariĝis “Kristo supren venis”, Preterito (angle “got up”). Sed en la simpla vulgara Latino ĝi estis Simpla Perfekto (ne ekzistanta en la angla, franca, kaj germana), do kun la signifo “has risen”, (estas leviĝinta). Ankaŭ en la afrikansa la signifo estas “estas ekstarinta”, do la Perfekta Agtempo; angle: “He has stood up” (NE He did stand up, kiel en la portugala). La signifo en la kataluna estas, kiel en la franca, la Perfekta Agtempo, “has risen”, estas leviĝinta. Ankaŭ en la nederlanda la signifo estas la Perfekta Agtempo, “estas leviĝinta”, kvankam ĝi uzas la helpverbon “esti” anstataŭ “havi”, kio estas indiferenta ĉar la participo tamen estas pasinttempa. La samon faras la provencala (sudfranca) lingvo, diranta: “Kristo estas leviĝinta”.

En ĉiuj ĉi supraj frazoj la (“-ed”+“-en”)-participoj estas Pasinttempaj Participoj (ĉiu kun la sama signifo), ĉu uzataj kun la helpverbo “havi”, (la plejmulto) ĉu kun la helpverbo “esti” (la netransitivaj esceptoj). Kaj kiam la angla uzas “has risen” tio estas Perfekta Tempo kaj kiam ĝi uzas “is risen” tiu esprimo estas Propozitiva Frazo kaj “risen” ne estas verbo sed (propozicia) adjektivo.

Do pri la ĉisupro mi samopinias kun Donald/Vilĉjo, kaj parte kun Wikipedia. Sed mia sola intenco estis, postuli ke oni nomu la participojn laŭ iliaj funkcioj, do ke ekzistas du “-ed”-participoj, la pasiva kaj la pasinta. Do ke ĝi estas Pasinttempa Participo en “We have received the letter yesterday”. Kaj ke ĝi estas Pasiva (sentempa) Participo en “The letter was received yesterday”. Mi komprenas, ke multaj eŭropaj lingvistoj (malĝuste) pensas kaj instruas, ke en la lasta frazo krom la helpverbo la participo ankaŭ indikas la agtempon, la pasintan tempon, ĉar ankaŭ mi, antaŭe eŭropano, sentas tion. Sed mi scias ke mia sento estas malprava, ĉar en la Prezenco kaj en la Futuro neniel temas pri la Pasinteco “The letter will be received tomorrow at 3 o’clock”. Se mi pensus ke en tiu lasta frazo la participo tamen havas iom da pasinteco en si, mi mensogus al mi mem. Same kiel la participo indikas neniun tempon en “The letter will be sent to-morrow” nek en “The letter is now (being) sent”, same ĝi ne povas havi pasintan tempon en la preterito “La letero estis FORSENDATA hieraŭ ekzakte je la tria horo”. (La tempon donas la helpverbo). Tiu fakto de la du “-ed”-participoj en la eŭropaj etnaj lingvoj ne multe gravus al mi se mi ne estus Esperantisto. Sed nun la Esperantistoj faras multajn participajn erarojn simple ĉar ili ne scias la veron en siaj etnaj lingvoj. Kaj ĉar en Esperanto oni uzas la helpverbon “esti” (anstataŭ “havi”), la Esperantistoj pensas ke ankaŭ en Esperanto estas tie same kiel en etnaj lingvoj pasinttempa participo (kiu ne estas) kun pasinttempa helpverbo. Do ili uzas du pasintajn tempojn kie estas nur unu en realeco en la etnaj lingvoj. Do por “La letero estis forsendata ekzakte je la tria horo” ili uzas en Esperanto “La letero estis forsenditaj ekzakte je la tria horo”, kio signifas ke hieraŭ je la tria horo la letero jam estis forsendita antaŭe, eble la pasintan tagon. Tiuj eraroj do estas sensencaj, kaj kreitaj pro la fakto, ke ili kun la ne-Esperantistoj kredas, ke “sent” ĉi tie havus (pasintan) tempon. Kaj tiuj eraroj plorigas min. Same kiel mia eraro “Morgaŭ ekzakte je la dua horo mi estos sendinta la leteron” anstataŭ “sendanta, (= sendos)” plorigos vin.

**Marcel Leereveld.**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

# El Brizbano

## JOFFRE BELL celebris sian 100an naskiĝdatrevenon




( bildo montras karan Joffre kaj eksAEA prezidantino, Diano Lukes en Clifton, 2018 )"

" Lastan semajnon eminenta TES Esperantisto, JOFFRE BELL celebris sian 100an naskiĝdatrevenon en Clifton. Ni deziras al li belegajn tempojn estonte. Per tio ankoraŭ estas pruvita lerni Esperanto en Kvinlando estas sana okupo. **Peter Danzer**



Kiu ne zorgas pri la vero en malgrandaj aferoj, oni ne povas fidi tiun pri gravaj aferoj. **Albert Einstein**



### Aliaj vidpunktoj pri mondaj aferoj

<https://www.greenvillepost.com/>

Multajn artikolojn vi povas legi en 21 lingvoj sed ne ĉiuj kaj neniu en Esperanto **Roger Springer**

### 3ZZZ

La elsendo de la 4a de majo 2020 proponas al vi informojn pri la Olimpiaj ludoj, kiuj estis planitaj por 2020 en Japanujo, pri la revolucio de la diantoj en Portugalujo, memorigas la aŭskultantojn pri la fama letero de la ĉefo Seattle . Fine amuzos vin la teksto de Vasily Devatjnin pri Esperanto kaj esperantistoj



**Franciska Toubale**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**